

Bulgara

ESPERANTISTO



1968

6

ENHAVO

Paĝo

Ĉefartikolo. Dek jarojn Bulgara Esperanta Teatro (Kunĉo Vâlev)	1
T. Dunĉeva. Ni protektu la naturon!	2
G. Simeonov. Esperanto en la praktiko	4
S. M. Simeonov. Patrino	5
Todorka Tonĉeva. Pasis ankoraŭ unu jaro	5

ORGANIZA VIVO

G. Petrov, R. A., Blago Dimitrov, Belĉo Krâstev, K. Mitrev, Ivan Jelev, Ivan Borisov Goĉev, Ivan Zahariev, Stefan Pavlov	6
Viktor Aroloviĉ. Hungara profesoro instruas Esperanton al sovetiaj gestudentoj	13
Teod. Kulagin. El Sovetunio	14
* * * Tra la mondo	16

Kovrilpaĝo: La geartistoj de Bulgara Esperanta Teatro prezentis en Varna la komedion „Akridoj“ de la bulgara verkisto St. L. Kostov.

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv. 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Ŝuhova ul. D. 5/7 kv. 44, Moskva, M—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**DEK JAROJN BULGARA ESPERANTA TEATRO**

La Bulgara Esperanta Teatro (BET) notas sian 10-an datrevenon. La bulgara esperantistaro povas inde fieri pri ĝi. Kaj danki al tiuj, kiuj kreis kaj konstante subtenis ĝin per sia energio, iniciatemo kaj klopodoj, per sia amo kaj fideleco.

La naskiĝo de BET signas pluan disvastiĝon de Esperanto en novajn sferojn. Ĉe ni la Internacia Lingvo trovis varmajn adeptojn ankaŭ en la teatra mondo. Kerno de BET fariĝis malgranda rondo de entuziasmaj artistoj-esperantistoj ĉe la eksa teatro „Trudov Front“ en Sofio, inter kiuj Anani Anev, Belka Beleva, Gerasim Mladenov, Kostadinka Nedeva, Georgi Kerelezov k. a. Daŭre ĝin subtenis la reĝisorino Stefka Prohaskova kaj la tradukisto kaj lingva gvidanto Kiril Drajev. La unua spektaklo, konsistanta el tri unuaktaj komedioj, poemoj kaj monologoj, okazis la 19-an de majo 1958 j. En la sama jaro ĝi estis ripetita dum la 33-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj en Varna. Kaj jam post unu jaro BET aperis antaŭ internacia publiko dum la 44-a Jubilea Kongreso de Esperanto en Varsovio (1959), kie ĝi prezentis la komedion „Ĉasantoj de oficoj“ de la bulgara klasikulo Ivan Vazov. Per la sama komedio la Teatro gastis al la tria Kultura Festivalo de la Jugoslaviaj Esperantistoj en Split (1960). Por la 34-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj en Veliko Târnovo BET preparis la faman verkon de Shakespeare (Ŝekspir) „Komedio de eraroj“, kiun ĝi prezentis ankaŭ dum la neforgesebla 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio (1963). La sekvan jaron du aktoroj de BET — Belka Beleva kaj Anani Anev — estis invititaj partopreni la spektaklojn de la Internacia Arta Teatro dum la 49-a Universala Kongreso de Esperanto en Hago kaj Amsterdam. Tie ili havis brilan sukceson en la komedio de Ĉeĥov „Propono“. Ĉio ĉi grave plialtigis la aŭtoritaton de BET en internacia skalo. Denove ĝi plezurigis la internacian esperantistaron dum la 51-a Kongreso de Esperanto en Budapeŝto (1966) per la spektaklo „Familiaj problemoj“, konsistanta el kelkaj eroj: la unuaktaj komedioj „La urso“ de A. P. Ĉeĥov, „La du ŝtelistoj“ de Br. Nuŝiĉ, „Familiaj problemoj“ de Maj Talvest kaj la dramigo „Tago de mortintoj“ laŭ Elin Pelin.

Komence de 1968 j. la Teatro iom renovigis sian konsiston. Ĝia lasta sukceso estas la spektaklo „Akridoj“, komedio de la bulgara verkisto St. L. Kostov, kiun ĝi prezentis dum la 20-a Jubilea Kongreso de la Internacia Fervojista Esperantista Federacio kaj la 37-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj en Varna. La granda sukceso de tiu spektaklo estas rezulto antaŭ ĉio de la altnivela ludo de la tuta kolektivo: la popola artistino Margarita

Duparinova, la geartistoj Miĥail Ĉobanov, Belka Beleva, Olga Popova, Miĥail Zdravev, Gerasim Mladenov, Kostadinka Nedeva, Vasilka Petrova, Anani Anev, Kunĉo Vălev, Georgi Kerelezov, la reĝisoro Anani Anev.

Dum la tuta 10-jara periodo de sia ekzistado BET ĉiam estis aktiva helpanto de nia E-movado. Entuziasme kaj senpofite ĝiaj membroj partoprenis koncertojn, celebroy, solenajn kunvenojn, vesperamuzojn k. s.

Dinamiko, temperamenteco, brila ĉizado de la figuroj, strebado al alta lingva nivelo kaj profesia majstreco — jen iuj el la karakterizaj kreaĵoj de la kolekto de BET, per kiuj ĝi ĉiam konkeras la korojn de la spektantoj.

BET konvinke manifestas la bonegajn kvalitojn de Esperanto kiel lingvo ankaŭ de la arto, de la teatro. Samtempe ĝi montras la forton kaj la konstantan kreskon de nia bulgara Esperanto-movado, kiu kreis sian Nacian Esperantan Teatron.

Sed la plej grandan meriton de la Bulgara Esperanta Teatro ni vidas en tio, ke ĝi konigas al la ekstera mondo elstarajn verkojn de nia nacia literaturo kaj gajnas novajn amikojn de nia Patrujo. Tio estas vojo de vera kultura interŝanĝo kaj kunlaboro inter la popoloj.

Laŭ tiu ĉi vojo BET devas firme marŝi, donante ankaŭ ĝi kontribuon en la batalo por paco kaj amikeco inter ĉiuj popoloj.

NI PROTEKTU LA NATURON

Jes, la naturo bezonas protekton kaj ĝi estas organizita jam en ĉiuj progresemaj landoj en la mondo. Ĝi transformiĝas en internacian problemon, por kies efektiviĝo estas organizita Internacia Unuiĝo por defendo de la Naturo.

La kemiigo de la naturo per iuj ne sufiĉe bone pristuditaj ankoraŭ kemiaĵoj povas montriĝi malutilaj por multaj plantoj kaj bestoj, eĉ por la homo. Oni rakontas, ke jam la germana imperiestro Fridriĥ la Granda koleriĝis ke la paseroj en liaj ĝardenoj kaj paruoj plimultiĝis kaj li ordonis neniigi ilin. Tamen, post nelonge la raŭpoj tiel plimultiĝis, ke la frukt-arboj komencis fariĝi vermaboritaj kaj li devone ordonis importi paserojn el Francio.

Post kiam en multnombraj ĉinaj urboj la paseroj estis mortigitaj, evidentiĝis ke nome por morusaj kaj aliaj arboj devas esti paseroj — kaj ili ankaŭ estis importitaj de Mongolio kaj de aliloke.

La birdoj inspiris Bethoven verki sian „Pastoralan simfonion“.

La franca entomologo Jan Fabr asertis, ke sen la birdoj la tero fariĝus viktimo de la insektoj. Sed hodiaŭ ni devus aldoni kaj plivastigi tiun penson — „Sen protekto de la naturo, la tero fariĝus viktimo de la kemio kaj tekniko“.

Evidentiĝis, ke la homo estas tre kruela ankaŭ rilate la belegajn interesajn kaj utilajn aspektojn kun siaj kunloĝantoj. Maljusta estis ankaŭ la milito kiun la ĉasistoj proklamis

ĉiuloke kontraŭ la rabajn birdojn kaj bestojn. La sovaĝaj bestoj estas protektendaj eĉ kiam ili kaŭzas malutilon al la nacia ekonomio aŭ prezentas danĝeron por la homoj. Ilia nombro reguliĝas ĝis la sendanĝera nombro, sed oni neniam devas neniigi ilin entute — almenaŭ nun, kiam preskaŭ ili ne ekzistas, ni komprenas ke multaj el ili estis utilaj kaj necesaj kiel reguligantoj de la natura ekvilibro kiel sanitaristoj, kiel viva ornamo. Kaj, se ili povus paroli, verŝajne ili nin riproĉus: „Homo, ne nomu nin rabistoj! Ĉar ni estas rabistoj nur kiam ni estas malsataj, diference de vi, kiu estas rabisto ĉiam“.

Post la apero de la eŭropanoj en Usono estis mortigitaj pli ol 50 specoj da birdoj kaj ankoraŭ tiom estas minacataj de malapero. En la funebra nomaro de la damnitaj birdoj kaj bestoj estas enskribitaj ĉirkaŭ 200 specoj, kaj multaj aliaj estas antaŭ la sojlo forpasi en la eternan regnon.

La kanto de la montara rivereto kaj la surrado de la folioj, la zumado de la insektoj, la ritma melodio de la maraj ondoj kuracas nian nervan sistemon. En la sanatorioj en Krimeo nervomalsanuloj ripozas bonege, dormigante ilin por longa trankvila dormo oni rekreis je manegtofono naturajn sonojn, eĉ je kantsimila monotona kanto de la pluv-gutoj, marbruon, la bruon de rivero. Al la homaro estas necesaj multaj puraj akvoj, kaj kantantoj, tiel, kiel ilin priantis Debussi.



ankaŭ akvoj — malavaraj kaj virtaj, kiel gloradas la antikvaj egiptoj la potencon de la rivero Nil en la himno antaŭ 3300 jaroj en la tempo de la faraono Menefta.

Sed ni ne sufiĉe ŝatas la naturon, ni mortigas ĝian belecon.

Lastatempe multe da riveroj estas kvazaŭ mortaj. La malutilaj defalaĵoj el la uzinoj kaj fabrikoj forpelis la birdojn, kaŭzis epidemion al la fiŝoj kaj malsanojn al la bestoj.

En Usono Rahil Karson en sia libro „Silentiginta printempo“ (New York, 1964) prezentas konvinkigajn faktojn rilate la mortigadon de la faŭno rezulte de la kemiigo de la kamparumstrumado — malaperas la fiŝoj en la riveroj kaj en la akvorezervujoj. La birdoj kiuj sin nutras per venenigitaj fiŝoj — la agloj, ardeoj, mevoj, pelikanoj kaj aliaj formortis, perdante la kapablojn daŭrigi sian genton. Eksilentas la kantbirdoj. Ili mortas, ĉar ilia nutraĵo — la t rvermoj kaj larvoj — enhavis altprocente koncentrigitan DDT.

La brustoj de la homoj pleniĝas per la fetoraj fumoj de la kamentuboj. Ili malsaniĝas, la nebuloj snbpremas la urbojn. Ĉiu kvina nervmalsanulo en Francio kaj Anglio suferas pro brumalsano. La karbona duoksido en la aero pligrandiĝis — la arboj kaj iliaj folioj frue velkas.

Vere, ni plantis novajn arbarojn eĉ multe pli. Tamen per ili ni redonos nur unu malgrandan parton de tiuj kiuj iam estis forhakitaj. Eble pro tio, la tero retiras jam sian akvon, fosas deklivojn kaj vokis la dezertojn, malprofundiĝis la riveroj, ŝlimkovriĝis la barajlagoj, sekiĝas la ĝardenoj kaj herbejoj. Uragano aŭ tajfuno venĝas pri la malŝpareme forhakitaj arbaroj.

Sur Rejn kaj Rur la verdaj arbustoj transformiĝas en sekajn branĉojn. Depost dekoj da jaroj en Rejn estas nenia fiŝo. En Tokio sekiĝas la ĉerizfloretoj.

En Los Anĝelos jam eĉ ne povas kreski spinaco.

La centra oficejo de sanprotektado en Usono konstatis:

„Ĉiu enspiro de la aero en la stratoj de la

urbo Manhatan estas ekvivalenta al la enspiro de la cigareda fumo“. Estas konstatita fakto, ke ŝoforo en Detroit enspiras tage la ekvivalenton de 20 cigaredoj“; vendisto de ĵurnaloj „Tajms Skuer“ en New York — 40, la reguliganto sur la strato „Pikadili“ en Londono — pli ol 100. La londonaj policianoj iufoje estas devigataj labori per kontraŭgasa masko; iliaj kolegoj en Tokio ĉiun duonhoron enspiras oksigenon de specialaj boteloj.

La korodaj gasoj efikas ne nur sur la homoj. Ĉe malseka sezono en Ĉikago la sternitaj najlonaj ŝtrumpoj disfaliĝas en la aero. La ŝtonoj de la katedralo en Koln fendiĝas, kaj sur la placo „Sankta Marko“ en Venecio la statuoj estas elmetitaj al difekto.

Dum la lastaj jaroj super la kapoj de la civitanoj de Nov-Jorko elversigis pli ol tri milionoj da tunoj da venenaj defalaĵoj kaj pli ol 200,000 tunoj da polvo kaj fulgoj. Iuj urboj en Okcidenta Germanio similas al Pompejo, surŝutita de la polvo de Vezuvij — la jarporcion de la malpurigo de la aero tie oni kalkulas je 150,000 ŝarĝvagonoj, 70% de kiu sterniĝis sur la regiono de Rur.

La ekzemploj do estas multaj.

1970 estas proklamita en la tuta mondo kiel „Jaro por protekto de la naturo“.

La Internacia Unuiĝo por Protektado de la Naturo kunsidas en Svislando. La inierkonsento, pri kiu nun laboras tiu organizacio havas celon ĉesigi la neniigadon de la minacataj bestaj specoj, sendepende ĉu rilatas sovaĝajn bestojn en Afriko, Azio aŭ Latina Ameriko, balenojn, fokojn en la Antarktido ktp. La besta mondo troviĝas je la limo de neniigado. La samo rilatas ankaŭ la maloftajn arbojn kaj florojn.

Ni devas protekti la multkolorajn variecojn de la naturo, por la feliĉa vivo de la homaro en la longa printempo, kiu venas kaj ĝi estu optimisma kiel „Fabelo pri la Viena arbaro“ de Strauss.

Homo, la naturo estas vivoplena ĵe beleco! Gardu ĝin!

T. Dunĉeva

INTERNACIA TENDUMADO EN HUNGARIO

De la 7-a ĝis la 17-a de julio 1968 en la departemento Baranja apud la urbo Pécs en montara regiono Ŝikonda oni organizas internacian tendumadon por esperantistaj junpioniroj (10—15 jaraĵ). La aliĝkotizo estas 560 forintoj.

En № 195 (1968) de *The Worker Esperantist*, aperanta en Essex, Britlando, aperis informo pri la broŝuro

Post la tendumado oni faros 4-tagan viziton en vilaĝo Abaliget, kie okazos esperantista naturamika renkontiĝo.

Por pliaj informoj skribu al la Organiza Komitato, Pécs 1. Pf. 2, Hungario.

„Esenco kaj agado de [la konsumkoop-erativoj en Bulgario“.

Estis aŭgusta tago. Krepuskiĝis malrapide. Okcidente la suno subiras milde. Mi staris antaŭ la dalioj en mia kortĝardeno kaj observadis la belajn de la naturo.

Iu frapis sur la eksteran pordon de la korto. Mi levis la kapon kaj vidis iun nekonatan homon.

Irante al la pordo mi aŭdis, ke nudkapa viro parolas fremdan lingvon.

— Ĉu vi parolas francan lingvon, — li demandis min france.

— Ne! — Mi respondis al li bulgare.

— Ĉu vi parolas germanan lingvon — demandis li min denove nun en germana.

— Ne! — Mi ree respondis al li. — Mi parolas nur la internacian lingvon Esperanto.

— Ho, mi same parolas Esperanton. Kia feliĉa renkonto estas, ke mi povis trafi esperantiston.

Ni tuj amike manpremis unu la alian.

— Do, bonvolu eniri en mian domon. Vi estos mia kara gasto, — mi invitis lin.

Ni eniris en la korton kaj preterpasante la daliojn li haltis por momento por ĝui la belajn de la floroj.

— Kiel bele estas, kiam oni posedas florgardenon kun aromaj floroj nur por propra gusto, — li reveme diris al mi klinante sin por flari la aromon de la ruĝaj rozoj.

— Dankon pri viaj afablaj vortoj — mi diris al li. — Nia tuta Bulgario estas unu granda, bela florgardeno, ĉar en ĉiu korto de nia lando estas multaj diversspecaj aromaj floroj.

Dum ni amike interparolis, mia edzino alportis du seĝojn kaj metis ilin sub la ombro de pirabo.

Mi prezentis mian edzinon al la gasto. Li ankaŭ prezentis sin.

— Mi estas germana turisto. Mia nomo estas Josef Schahrat de Köln, Okcidenta Germanio. Mi estis en Sofio, kie mi havas korrespondanton. Mi vojaĝas al Varna. Oni diras, ke per vaporŝipo estas pli agraba la vojaĝo. Tiel mi vizitis urbon Vidin, poste Ruse kaj finfine — Varna. Dezirante ekkoni pli bone la urbon mi profunde eniris ĝin kaj nun mi forgesis la direkton de la strato N., kie mi estas en privata domo.

— Estu trankvila, kara gasto. Mi montros la domon kie vi loĝas nun.

— Pli ol unu horo mi erare vagis sur la stratoj. Mi demandis pli ol dek homojn, parolante aŭ germane aŭ france, sed neniun povis kompreni min kaj montri mian loĝejon. Mi ne supozis ke pli facile estas trovebla esperan-

tisto ol homoj parolantaj francan aŭ germanan lingvon.

— Feliĉa okazo estas, ke vi ĝuste antaŭ mia domo haltis kaj ĝuste min trafis, serĉante vian loĝejon, — mi denove trankviligis lin.

Dume mia edzino regalis nin per fruktoj de nia ĝardeno kaj fine per konfitaĵo el abrikotoj, kaj ni trinkis malvarman glason da akvo.

Post duonhora babilado pri diversaj ĝenerallaj problemoj ni eliris por renkontiĝi kun aliaj geesperantistoj de la urbo.

Unue ni vizitis nian prezidanton k-do Nikolv. Li tuj telefone informis la sekretarion de nia societo k-do Dekov. Post nelonga tempo ni kvarope promenadis en nia bela apudnuba ĝardeno parolante laŭte en Esperanto.

Laŭ la bulgara kutimo ni devis regali nian karan gaston kaj pro tio ni eniris en apudnuban dolĉaĵejon.

Ni parolis pri la tutmonda E-movado. Li, la germana gasto, informis nin, ke la movado en Germanio bone marŝas dank' al la internacia turismo. Esperanto pravas sian praktikan neceson. Li aldonis:

— Tio estis por mi grava evento, ĉar mi nur per Esperanto povis trovi amikan atmosferon en unu fremda, malproksima lando. Per Esperanto mi ĉiam kaj ĉie trovos geamikojn, kiuj helpos min dum la vojaĝo.

La sekvintan tagon ni akompanis nian karan gaston ĝis la danuba haveno, kie per vaporŝipo li forveturis al Ruse.

Ni tre varme disliĝis, dezirante al li feliĉan vojaĝon kaj agrablajn travivaĵojn en Varna.

G. Simeonov

Noto de la redakcio:

Tiu okazintaĵo denove pravas ke estas esperantistoj, kiuj per la naciaj lingvoj klopodas ricevi informojn en eksterlando, sed eĉ ne provas demandi ĉu oni parolas la internacian lingvon Esperanto. Eĉ por propagando de la lingvo en eksterlando ni ĉiam devas demandi ĉu oni parolas Esperanton.

Veturante al eksterlando oni devas kunporti la jarlibron de UEA kaj aliajn utilajn adresojn de esperantistoj en la vizitataj loĝlokoj. Ĉiu esperantisto devas meti sur la pordon de sia domo ŝildeton kun surskribo „Esperanto parolata“. Tio estas necesa por informo de preterpasantaj esperantistoj kaj ankaŭ por propagando de Esperanto kaj ties movado.

Kion opinias vi, karaj gelegantoj, pri tiuj aferoj?



PATRINO

de Simeon M. Simeonov

Plenaj je teruro kaj sufer' sublima,
du okuloj kun esper' rigardas vin;
superplenaj je riproĉ' kaj am' senlima
vin rigardas la okuloj de l' patrin'.

De l' patrino du okuloj larmoplenaj,
vin demandas kaj atendas por respond',
pro l' milito alarmitaj kaj ĉagrenaj
pri la sorto de la homoj en la mond'.

Du okuloj spegulintaj la doloron
de l' patrino koro en infera temp',
nun demandas: „Ĉu vi aŭdas mian ploron,
homoj, ĉu de l' paco venos la printemp'?"

Mi vln naskis, mi vin amas, filoj miaj,
ho, ĉesigu la sangverŝojn sur la Ter'!
Min frakasas viaj sortoj tragediaj,
via vivo en militoj kaj m zer'.

PASIS ANKORAŬ UNU JARO...

La 17-an de marto 1968, en la salono de DP „Transpred“ en Jambol okazis la jarkunveno de E-societo „Maksim Gorkij“ kaj de la Distrikta Komitato de BEA.

Ĉeestis multaj geesperantistoj el Jambol kaj reprezentantoj de la novfonditaj E-societoj en Jambol — Poŝtista kaj Fervoĵista, el urbo Elĥovo kaj el vilaĝo Zimnica.

La jarkunvenon malfermis kaj gvidis k-do Bojan Kuŝev. Post la elekto de prezidanto de la kunveno ĉiuj ĉeestintoj per unuminuta silento esprimis sian estimon al la forpasinta membro de nia societo Panajot Bambaldokov, ekspartizano kaj aktiva batalinto kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo.

La prezidanto de la Distrikta Komitato kaj de E-societo „Maksim Gorkij“ k-do Dimo Trudoljubov raportis pri la jaragado. Li diris, ke nia societo dum 1967 disvolvis viglan agadon.

K-do Kutju Zlatarov, prezidanto de la kontrola komisiono, raportis pri la farita kontrolo.

Oni tralegis ankaŭ la rezoluciojn pri la estonta laboro de DK de BEA kaj de E-societo „Maksim Gorkij“.

Konekse kun la agado de la Estraro, de la Kontrola Komisiono kaj de la Junulara Grupo eldirojn faris multaj esperantistoj.

La reprezentanto de la Distrikta Komitato de BKP k-do Petr Ĉomakov je la nomo de DK de BKP kaj je sia nomo salutis la kunvenon kaj bondeziris al la esperantistoj pli grandajn sukcesojn dum la kuranta jaro.

En la fino de la kunveno oni elektis novan DK de BEA, Estraron, Kontrolan Komisionon kaj junularan grupon de E-societo „Maksim Gorkij“.

K-do Bojan Kuŝev tralegis tekston de telegramo al CK de BEA.

Todorka Tonĉeva

Homo, vi kiu vin pretigas fariĝi gasto de malproksimaj planedoj kaj volas kiel vaganto migri inter la steloj!

Homo, ne forlasu kiel krimulo la teron — forkonsumita kaj ofendita — malriĉigita kaj humiligita!

Homo, estimu la naturon de la tero, kiu donis karnon al via vivo!



Gvidante sin de tiu popola saĝeco, la nova estraro de E-societo „Printempo“ ĉe Sofia Urba Transporto eklaboris kun granda deziro kaj obstineco por strikta plenumo de la antaŭstarantaj taskoj. Oni speciale turnas atenton al la stabiligo de la organiza kaj financa stato. Ĉi rilate ni atingis bonajn rezultojn. Ĝis 3. IV. 1968 la societo pagis membrokotizon al BEA por la tuta 1968 jaro 100%. Kompare kun la plano por 1967 jaro, la membroj de la societo plimultiĝis per 10 personoj. La abonantoj de „Bulgara Esperantisto“ superis la planon 170%. Tiu fakto konvinke argumentas ke la esperantistaro de la Urba Transporto legas kaj disvastigas nian organon. Por la popularigo de la E-societo inter nia kolektivo oni entreprenas ankaŭ aliajn aferojn. Konstanta ekspozicia vitrino kies propagandajn materialojn oni anstataŭas periode, bone prezentas Esperanton. Oni preparis specialan poŝteston kaj ŝildon kun la nomo de la societo sur la pordo de la klubejo. Malgraŭ ke la klubejo estas kuna kun la sindikata organizaĵo, tio por ni estas granda sukceso. Tiom da jaroj ni klopodis pri tiu atingo. En la klubejo ni aranĝis skribtablon por la societa dokumentaro. Sur la muro unuavice kun aliaj portretoj oni vidas ankaŭ la portreton de D-ro Zamenhof.

Konekse kun la 37-a kongreso de la bulgaraj geesperantistoj kaj la IX monda festivalo de la junularo kaj la studen-



toj, kiu okazos en Sofio, ni organizis kaj komencis novan kurson de Esperanto por komencantoj. La kondiĉoj estas tre bonaj pro tio, ke la kursa kotizo estas minimuma, tiel ke la kursgvidanto instruas senpage kaj kun granda deziro kaj amo al Esperanto. Ĉiuj enspezoj estas por la societa kaso. Krome unu saman lecionon oni studas du foje en la semajno en diversaj tagoj. Sendepende de la ŝanĝoj, la 25 gekursanoj kiuj laboras en la tramoj, la trolebusoj kaj la aŭtobusoj, havas la bonan eblecon studi la internacian lingvon. Sendube ili fariĝos bonaj esperantistoj. Sed tio dependos ne nur de la kursgvidanto, sed ankaŭ de la tuta estraro. La komenco estas bona kaj la rezulto devos esti bonega. Tio estas ebla, sed estas necesa laboro, konstanta kaj granda amo al Esperanto flanke de ĉiuj geesperantistoj, kiuj laboras en nia granda entreprenejo.

G. Petrov

24 gelernantoj-esperantistoj kun kursgvidanto Sava Paunov el la mezgrada Politeknika Lernejo „Kliment Ohridski“ en Peŝtera sendis gratulleteron al CK

de BEA okaze de la 60-jara datreveno de la fondiĝo de BEA kaj la honorigo per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — la grado.

LA UNUA GELERNANTA E-SOCIETO FONDITA

La junularo estas nia estonto !

Kiam oni asertas, ke Bulgario estas citadelo de Esperanto certe oni havas antaŭvide la statistikon, kiu montras, ke en 95 bulgaraj lernejoj Esperanto estas instruata, kaj multaj junuloj ekposedas la internacian lingvon ekde la lernejaj benkoj, esperiga fakto, kiu pravigas la lokon okupatan de Bulgario en internacia skalo.

En Miĥajlovgrad, Vraca, Kazanlâk k. a. urboj granda parto de la esperantistoj estas gelernantoj. Per sia logikeco kaj facileco Esperanto altiras la junularon. Tamen, krom la laŭdinda iniciato instrui la lingvon inter la gelernantoj, la praktiko montras, ke estas necesa organizaĵo, kies formoj de agado korespondas al la postuloj de la junularo. La unuaj kiuj jam maturiĝis por simila agado estis la gelernantoj de la II-a Politeknika gimnazio en urbo Vraca.

La 18-an de marto okazis solenaĵo dediĉita al la fondiĝo de gelernanta E-societo „Verda Raketo“.

La Sindikata Domo „Jordan Ljutibrodski“ estis plenplena de lernantoj kaj civitanoj — esperantistoj kaj simpatiantoj al la movado.



Raporton faris B. Mladenov, instruisto ĉe II-a Gimnazio kaj gvidanto de la ĝisnuna E-grupo „Verda Raketo“.

La raporto kies enhavo prezentis plektajon el saĝaj eldiroj kaj historiaj eventoj malkovris la esencon de la internacia lingvo — internacia komprenilo. Pli elokvente tamen efikis la atingitaj rezultoj de la junaj esperantistoj. La publiko eksciis pri ilia multflanka agado.

Grupo konsistanta el 20 gelernantoj en 1962 en daŭro de 5 jaroj plikreskis al 142 — ĉiuj pagintaj sian membrokotizon kaj abonis la revuon „Bulgara Esperantisto“. La grupanoj vizitis la kongreson de TEJO en Pécs (Hungario) partoprenis alilandajn festivalojn, seminariojn kaj antaŭ ĉio subtenas vastan korespondadon kun esperantistoj de la tuta terglobo. Tiaspeca



agado helpas ilian kulturen disvolviĝon. Tute sincere eksonis la laŭdo de la raportanto, ke ĉiuj lernantoj-esperantistoj estas rekorduloj en la gimnazio, kaj plej disciplinitaj en la agado por paco kaj internacia amikeco.

En la fino de sia raporto B. Mladenov deklaris la transformiĝon de la ĝisnuna E-grupo „Verda Raketo“ en gelernantan E-societon „Verda Raketo“.

La publiko aplaŭdegis la fondiĝon de la nova Societo.

La estraro de la societo konsistas ekskluzive el gelernantoj, kiujn la voĉdonintoj unuanime elektis. La dua parto de la tagordo ne malpli ol la unua emociis la aŭskultantojn.

Du gimnazianoj rakontis siajn travivaĵojn inter esperantista medio en nacia kaj internacia skalo kaj alvokis la ceterajn gelernantojn de la II-a gimnazio aliĝi al la societo.

En sia salutparolado en kiu la Direktlorino de la gimnazio deklaris sian plenan senrezervan apogon al la societo kaj bondeziris ke dum la II-a gimnazio ekzistos, Esperanto estu instruata en ĝi — en la salono eksplodis tondra aplaŭdo.

K-do E. Daskalov bondeziris sukceson al la societo.

Oni tralegis multajn saluttelegramojn ricevitaĵojn el malproksimaj kaj najbaraj landoj: Jugoslavio, Hungario, Pollando, Sovetunio, Nederlando.

Reprezentanto de BEA salutis la fondiĝon de la unua gelernanta E-societo, dezirante ke ĝi estu ĉiam imitinda ekzemplo por tiuj, kiuj sekvas ĝian vojon.

La nova estraro akceptis ankaŭ la bondeziraĵojn je la nomo de la Instruista Sekcio kaj de la Sofiaj instruistoj-esperantistoj.

La 18-an de marto 1968 sur la verdstela firmamento de Vraca ekpulsis „Verda Raketo“.

R. A.



E-Societo en Madan, nomata „Bjalistok“, estas tute nova, sed nur en daŭro de unu jaro ĝi fariĝis modela ne nur en la distrikto de Smoljan, sed en la regiono de tuta Rodopi-montaro. Tuj post ĝia fondiĝo je la 17. X. 1966 ni malfermis kurson nur kun kelkaj partoprenintoj.

Kaj nun, je la 9-a de marto 1968, kiam la societo havas multajn membrojn kaj gekursanojn, ĝi organizis por ili grandan esperantan printempan balon, kiu kontentigis ĉiujn, kaj la societo gajnis la fidon de la Distrikta Komitato en Smoljan, kaj de ĉiuj societoj en la distrikto kaj ekster ĝi.

La salono, bone kaj konvene dekorita, estis malvasta enteni la 160 geesperantistojn venintajn el la tuta distrikto. Al nia invito respondis per amasa gastado la gestudentoj de societo „Flugo“ en Smoljan — partoprenis 30 personoj. El ĉelima urbo Zlatograd venis 20 geesperantistoj. La novefondita societo en vilaĝo Nedelino sendis 10 personojn. Venis ankaŭ tiom da geesperantistoj el urbo Kârĝali. La antaŭ nelonge fondita societo „Espero“ en vilaĝo Borieva partoprenis per 15 geesperantistoj. Sed kompreneble plej agemaj kaj multnombraj estis la membroj de „Bjalistok“, kiuj laboris senlace por la bona organizado de la balo. Oni presigis specialan invitilon en Esperanto kaj al ĉiu vizitinto oni donis en speciala koverto ilustritan karteton kun vidaĵo de Madan kun surskribo „Feliĉan printempon!“

En la balo ludis ĵazorkestro. Oni re-

TRJAVNA. En la komenco de marto E-societo „Verda Standardo“ okazigis sian jarkunvenon.

La raporto, kiun tralegis Iv. Gâmzov — prezidanto de la societo, provokis viglajn diskutojn. La ĉeestantoj faris valorajn proponojn, kiujn la nova estraro konsideros en sia estonta laboro.

Oni elektis novan estraron: Ivan Gâmzov — prezidanto, Pavel Hârlov — sekretario. Iv. Geŝkov — kasisto, membroj: Gjulka Kirilova



citis, kantis. La prezidanto de DK en Smoljan k-do Jordan Jordanov gratulis la iniciaton kaj bondeziris ke ĝi fariĝu tradicia. K-do Hristo Kerelezov el Kârĝali invitis la esperantistojn el la distrikto de Smoljan gastigi al ili en Kârĝali. K-ino Blaga Despotova el Zlatograd dankis pri la organizado de la balo. K-do Emil Ĉirpanski, prezidanto de „Flugo“ en Smoljan, subskribis kontrakton pri nobla konkurado kun Madan. K-do Hristo Dimitrov el vilaĝo Nedelino esprimis sian ĝojon per recitado de sia versaĵo en Esperanto. Je la nomo de la Urba Komitato de Komsomolo k-do Rajĉo Damjanov alte priaksis la societatan agadon kaj promesis sian helpon altiri la komsomolanojn en la studado de Esperanto.

Oni ricevis multajn gratulleterojn el diversaj landoj. Oni aranĝis ankaŭ tombolon. La balo daŭris ĝis frua mateno kaj en bona humoro oni dancis kaj kantis.

Geesperantistoj, sekvu la ekzemplon de „Bjalistok“ en Madan!

E-societo „Espero“ en vilaĝo Borieva

kaj D-ro M. Miĥajlov. Kontrola komisiono: Petko Najdenov, D. Miĥalev kaj Boĵidarka Ivanova.

Je la fino de la kunveno oficiale estis fermita E-kurso. La kursgvidanto Iv. Gâmzov per kelkaj vortoj salutis la gekursanojn kaj disdonis al ili la atestojn por finita kurso de Esperanto.

Je la nomo de la gekursanoj respondis kaj dankis k-dino Boĵidarka Ivanova.

La gekursanoj estis salutitaj ankaŭ de la sekretario k-do Pavel Hârlov.



En la komenco de la lernojaro 1967/1968 en la maŝintraktora lernejo „G. Dimitrov“ en Ĉirpan por dua fojo sub la gvidado de la entuziasma instruisto-esperantisto Taŝko Georgiev estis malf-ermita kurso de Esperanto en II d kla-so, kun 27 gelernantoj.

Ĉiuj gekursanoj tre regule vizitis la lecionojn kaj entuziasme kaj serioze lernis la lingvon.

Je la 23-a de marto la estraro de la E-societo „Mondamikeco“ faris ekzame-non — skriban kaj buŝan laŭ la progra-mo. La rezulto de la ekzameno estis tre bona.

La kursgvidanto Taŝko Georgiev en-manigis al la gekursanoj la atestojn por sukcese finita kurso.



La prezidanto de la E-societo Petr Ŝoparov enmanigis al ĉiuj gekursanoj po unu esperanta verda stelo.

Blago Dimitrov

NOVA E-SOCIETO EN VELIKO TARNOVO

En la fino de marto la gestudentoj en Veliko Târnovo fondis sian E-so-cieton.

25 gestudentoj, gvidataj de nia ko-lego Dimitr Hristov, kiu nur antaŭ unu jaro ricevis internacian ateston pri instrukapablo en Hungario, komencis lerni la internacian lingvon.

Studi lingvon, kvankam ĝi estas Es-peranto ne estas tute facila afero. Komp-reneble la bonaj rezultoj ne malfruigis. La gestudentoj faris la unuajn paŝojn, ili lernis obstine kaj diligente. La ge-studentoj komencis korespondi kun amikoj el multaj landoj. Ili regule vi-zitas la Esperanto-klubejon en la urbo, legas revuojn, gazetojn kaj leterojn el eksterlando, disputas pri diversaj pro-blemoj, amuziĝas. Tio variigas ilian ĉiutagecon, fortikigas ankoraŭ pli la internacian amikecon.

DIMITROVGRAD. Konekse kun nia 37-a Nacia E-kongreso la E-societo „Flamo“ malfermis E-kurson por ko-mencantoj.

La entuziasmo inter la malnovaj sa-mideanoj estas granda kaj ili ĉiam par-toprenas la lecionojn.

Emocia estis la renkontiĝo de la junaj geesperantistoj kun la prezidanto de STELO — Bojidar Leonov. Multajn interesajn aferojn rakontis li al la sciemaj gestudentoj, konatigis ilin kun la taskoj kaj la iniciatoj de STELO.

La plej granda ĝojo venis kiam laŭ la decido de la Estraro de STELO k-do Leonov proponis al la gestuden-toj de Supera Pedagogia Instituto „Bratja Kiril kaj Metodij“ fondi sian E-societon. La gestudentoj nomis ĝin „**Flamo**“. Estis elektita Estraro de la societo: Prezidanto — Dimitr Hristov, vicprezidanto kaj kasisto — Nadejda Miĥajlova, sekretario — Belco Krâstev, membro — M. Georgieva.

Ankoraŭ unu nova E-stelo aperis sur la firmamento.

Belco Krâstev

La societo jam havas novan klu-bejon, kiu povas enteni ĉiujn deziran-tojn lerni la lingvon.

La kurso estas senpaga, sed tio ne malhelpas la lektoron esti regula, ĉar li arde deziras prepari novajn esperan-tistojn.

K. Mitrev

ESPERANTO KAJ FILATELIO

Je la 10-a de marto en la Klubejo de E-societo „Roza Valo“ en Kazanlâk okazis la jar-kunveno de la filatelistoj inter kiuj estas ankaj esperantistoj. Post la raporto de la prezidanto k-do arĥitekto Nikolaj Kadiev (esperantisto) en la diskutoj pri la agado de la filatelistoj la esperantisto Ivan Zahariev parolis pri la proksimeco inter la celoj de la esperantistoj kaj filatelistoj.

Antaŭ ĉio, diris li, per lingvo internacia kaj la poŝtmarko ni batalas por Paco kaj disvastigas la socialismajn atingaĵojn de PR Bulgario. Ni strebas al unueco, batalas kaj masonas la homan fratecon, ni konatiĝas kun la arto de la popoloj, kun la diversnacia scienco. Ni ankaŭ ĝuas la novan vivon en kiu ŝprucas ĝojo pri ĉiu homa ekzistaĵo. Nome pro tio, mi levas jenan sloganon: „Ĉiu filatelisto — esperantisto, ĉiu esperantisto — filatelisto“.

VESPERO PRI INTERBRIGADANO

Je la 15-a de marto E-societo „Roza Valo“ en Kazanlâk organizis kune kun la Mekanika teknika Instituto vesperon dediĉitan al la esperantisto kaj interbrigadano Petr Jonkov, pereinta en la hispana intercivitana milito en monato julio 1938 jaro.

Petr Jonkov estis klasika revoluciulo, arda esperantisto kaj vera komunisto. Li partoprenis en la Unua kontraŭfaŝisma ribelo en 1923 j. kune kun siaj du fratoj kaj sia patro en la okcidenta parto de la Roza Valo en vilaĝoj Tâja, Manolovo, Târniĉane, Gabarevo. Post tio li estis kondamnita kaj restis en la malliberejo de Stara Zagora en daŭro de unu jaro. Li uzis vaste la lingvon internacian Esperanto, havis multajn gekorespondantojn el la tuta mondo kaj precipe el la grandega USSR. Nur kelkajn horojn post lia pereco, al lia adreso alvenis la lasta letero en Esperanto, sendita de la sovetaj gekamaradoj, sed li ne havis eblecon ĝui ĝin, ĉar la kuglo haltigis la baton de lia heroa koro.

Ivan Jelev

VILAĜO TROJANOVO, DISTRIKTO DE STARA ZAGORA

La estraro de E-societo „Espero“ en urbo Radnevo pere de k-do Daĉo Dinev Tonev vizitis la direktoron de la lernejo en vil. Trojanovo, k-don Ganĉo Delev, kiu akceptis la proponon pri instruado de Esperanto kun granda deziro. Por realigi la celon li rekomendis al ĉiuj siaj gekolegoj, ke ili proponu al la ĝelernantoj partopreni en la kursoj de Esperanto, kaj en januaro 1968 ni malfermis kaj en la momento funkcias kaj funkcios ĝis la fino de majo.

La unua kurso konsistas el 15 ĝelernantoj

el la III kaj IV klasoj; la dua konsistas el 17 ĝelernantoj el la V, VI kaj VII klasoj.

Mi devas emfazi, ke la intereso estas tre granda kaj la partoprenintoj bone perceptas la instruitan materialon.

Ĝvidanto de la kursoj estas k-do Daĉo Dinev Tonev el urbo Radnevo.

Ni opinias, ke dum la lernejo 1968/1969 ni povos malfermi aliajn kursojn por studado de Esperanto en vilaĝo Trojanovo.

Ivan Borisov Ĝoĉev

Sekretario de E-societo en Radnevo

E-EKSPOZICIO

De la 1-a ĝis la 10-a de decembro 1967 Bulgara Esperanto-Muzeo kun la helpo de la Nacia Biblioteko en Sofio aranĝis en la Biblioteko esperantan ekspozicion, vizitita de ĉ. 800 personoj.

Ĝi estis dediĉita al la 80-jara datreveno de la kreo de Esperanto kaj 60 jaroj de la fondiĝo de Bulgara Esperantista Asocio.



Estis montritaj la unua bulgara E-lernolibro (1890), alia de 1895 kaj 1900; la unuaj bulgaraj E-gazetoj (1902, 1904, 1906, 1907); albumoj kun fotoj de diversaj E-kongresoj kaj konferencoj dum la jaroj 1906—10, precipe el Francio, portretoj de universalaj, bulgaraj kaj rumanaĵ naciaj E-kongresoj; grandaj albumoj kun P. K. II. el la tuta mondo.



Je la 24-a de marto la anoj de E-societo „Roza Valo“ en Kazanlâk jarkunvenis. Malgraŭ ke la intereso al tiu ĉi jarkunveno estis tre granda, la ĉeestintoj ne estis multaj pro iaj malkonsentoj. Tio influis al nia poresperanta laboro. Je la jarkunveno ne ĉeestis reprezentanto de Distrikta Komitato en Stara Zagora, sed kara gasto estis k-do Boris Avramov el la Urba Komitato de BKP en Kazanlâk.

Pri la agado de la societa estraro prelegis k-do D. Martinov. La donitaj faktoj estis en sia granda parto pozitivaj — kiel VII Junulara Festivalo, kiu okazis en Kazanlâk, kelke da ekskursoj, kelke da Esperanto-kursoj ktp. Mankis memkritiko. La ĉeestintoj parolis sincere kaj zorgeme. Faris eldirojn M. Ĉelebonov, Iv. Jelev, G. Nestorov, Hr. Enev, Paun Nestorov ka. Oni povis vidi la veran situacion. La kunveno planis konkretan estontan poresperantan laboron, elektis novan estraron kun prezidanto Nikola Georgiev kaj sekretario Kiril Ĉindin. Kiel plej gravaj kaj aktualaj taskoj estas jenaj: pli viglaj ligoj kun BEA,

pli multaj abonantoj al „Bulgara Fesperantisto“, altiro de la forpelita anaro, Esperanto-kursoj, amuzoj, ekskursoj ka.

Estas tre gravaj kaj interesaj la eldiroj de la reprezentanto de BKP k-do Boris Avramov. Li diris konklude jenon: . . . „Nobla estas la celo de la internacia lingvo Esperanto. Hodiaŭ per Esperanto vi enskribis en vian taglibron gravajn sukcesojn. Per la Zamenhofa lingvo vi batalas vigle por paco. . . vi servas al nia kara socialisma Patrolando. . . al nia jam bone organizita turismo Neniu forgesu, ke Kazanlâk nun kreskas kiel bonega turisma centro. La naturo en Roza Valo estas tiom malavara — inter du montoj rozĝardenoj, fruktoĝardenoj, banlokoj, historiaj monumentoj kaj gastama loĝantaro. Krom tio ni estas la centra krucvojo en PR Bulgario. . . Do, vi devas eĉ de nun esti unuanimaj kaj plenumi viajn Esperanto-devojn. Laŭ mi, la neĝo jam ne estas, sed estas printempo ankaŭ por vi!“

Ivan Zahariev

LERTA GVIDADO — BONAJ REZULTOJ

Je la 23-a de marto DK de BEA en Smoljan okazigis sian duan jarraportelektan konferencon. Ĝi pridiskutis kaj akceptis la planon kaj buĝeton por 1968 j. Raporton pri la jaragado de la komitato faris ĝia prezidanto Jordan Jordanov.

En la konferenclaboro partoprenis la reprezentanto de DK de BKP Iv. Gavazov, de DF „Klerigo“ M. Keremidĉiev, kiuj donis bonan pritakson de la agado.

Dum la lastaj jaroj la E-movado en la distrikto de Smoljan havas grandan popularecon kaj estas montrata kiel ekzemplo. Ĉar DK kapablas organizi la membrojn por efektiviĝi la taskojn metitajn de CK de BEA kunigitajn kun la gvidlinio de la Partio. Tio montiras ankaŭ la atingitajn sukcesojn dum la jaro — jaro de du memorindaj jubileoj — 50-a datreveno de GOSR kaj 40-jara jubileo de E-movado en la regiono de Smoljan.

La prisidkutitaj problemoj estis profunde pripensitaj kaj ĉiam oni serĉis la

helpon de la komsomolaj kaj partia estraroj.

La plej granda sukceso de DK estas la organizita nacia kurso por lernado kaj perfektigado de Esperanto en ripozejo Pamporovo. Partoprenis 78 kursanoj, 37 el kiuj estis el la distrikto de Smoljan. Por realigo de tiu iniciato DK estas dankema al T. Bobotantov, Str. Spasov, D. Marev.

Dum la lernojaro estis organizitaj 18 kursoj. Plej grandajn sukcesojn atingis la esperantistoj de Zlatogrado per la agado de Julia Blagoeva kaj Blaga Despotova. Laŭdindan agadon disvolvas ankaŭ Iv. Pavlova en vil. Nedelino, E. Ĉirpanski en la porinstruista instituto en Smoljan, Iv. Karaminev en Madan.

La junaj esperantistoj partoprenis en la internacia laborbrigado en Loveĉ, en la nacia studenta konferenco en Svišov.

La nombro de la organizitaj esperantistoj sufiĉe plialtiĝis, oni fondis 3 novajn E-societojn kaj du junularajn

grupojn.

La prezidanto de E-societo en Zlatograd V. Pašliev gvidas tre lerte la financajn aferojn.

En la konkurado konekse kun la antaŭstaranta 37-a kongreso de BEA Smoljan okupas unuan lokon.

La organizita presejo-bindejo „Esperanto“ prezentis bonan materialan bazon por la movado.

La laboro de la estraro estas laŭ-

dinda. La helpo de BKP kaj de aliaj organizaĵoj estis ĝustatempa kaj efika.

K-do Keremidčiev diris: „Se la scio de unu lingvo estas riĉeco, tiam la posedo de Esperanto estas trezoro“.

La atingitaj sukcesoj ĉiam provokas novajn sukcesojn. Ĉi-jare DK organizas internaciajn E-kursojn — la unuajn en nia lando.

Stefan Pavlov

UNU BONA AMIKO DE ESPERANTO FORPISIS

Hristo Mirski, honora membro de „Albatro“ — Varna ne estas jam inter ni, la vivaj, de decembro 1967.

Filo de Krâstju Mirski, la fondinto de „Frateco—Albatro“ (1903), li restis dum la tuta sia vivo ĉiam fidela bona amiko de Esperanto.

Li zorge gardis la esperantan arĥivon de sia patro kaj lian bibliotekon, el kiuj donacis al nia societo gravajn dokumentojn kaj altvalorajn malnovajn esperantaĵojn, fotojn k. a.

Liaj ĉeestoj en niaj kunvenoj, konferencoj kaj kongresoj ĉiam inspiris nin al pli da fideleco, pli da sindonemo, pli da firma kredo je la Esperanto-movado, al pli da senlaca laboro kaj vigla agado por kaj per Esperanto.

Hristo Mirski estis ĉiam senhezita demokrato, kiel sia patro, kaj honorinda advokato, bone konata al nia urbano. Modesta kaj honesta, kompatema

kaj neprofitema. Konsolo kaj distro en lia pensiula soleco estis por li nur la plumo, per kiu li ĉiutage skribis siajn rememorojn kaj revojn pri la bono kaj belo en la vivo de nia popolo.

Lastan fojon li estis inter ni en nia E-klubejo la 10-an de oktobro 1967, okaze de publika kunveno pri la 50-a datreveno de la Oktobra Socialisma Revolucio, kiu kunveno estis anoncita en la kroniko de la loka gazeto — li rimarkis la anonceton kaj venis ĉeesti, ne atendis specialan inviton, ne preferis resti hejme en trankvila ripozo kaj en neglekto al la socia vivo kaj al la E-movado.

Ekzemplo por multaj el ni restas la honorinda nia samideano Hristo Kr. Mirski, la bona amiko de Esperanto.

Estu eterna la rememoro pri li!

Zora Mladenova Hans

PANAJOT ATANASOV BAMBALDOKOV

La 2-an de januaro 1968 en Jambol forpasis la aktiva batalinto kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo Panajot Bambaldokov.

P. Bambaldokov naskiĝis en 1906 en Jambol, en progresema familio, kaj en sia infanaĝo kundividis la pezan sorton de la malriĉaj homoj, travivinte ĉiujn suferojn de la kapitalisma sklaveco. Kiel junulo li aktive partoprenis en la bataloj de la laborista klaso kaj ekde 1933 j. Bambaldokov trovis sian lokon en la vicoj de la Bulgara Komunista Partio. Li partoprenis en



la striko de l'labo-rista klaso kaj en la konspira agado de la Partio kiel politika malliberulo, kaŝanto kaj partizano. Pro tiu lia agado la faŝisma reĝimo kondamnis lin je 12 jaroj da malliberejo,

La verda stelo



ankaŭ altiris Bambaldokov, en 1933 li komenciis lerni Esperanton.

Post la popola venko je la naŭa de septembro 1944 P. Bambaldokov aktive partoprenis en la plifirmigo de la popola demokrata reĝimo kaj en la konstruado de la socialismo kiel komandanto de Jambol, prezidanto de la Distrikta Komitato de BKP, direktoro de la

irigacia sistemo de Jambol.

Forpasis la belega homo, sindona kamarado kaj inspirita komunisto. Liaj kamaradoj, ĉiuj komunistoj, ĉiuj esperantistoj el Jambol konservis daŭran rememoron pri la neforgesebla kunbatalinto Panajot Bambaldokov.

Nia riverenco antaŭ liaj grandaj meritoj.

La esperantistoj el Jambol

TRA LA GAZETARO

En revuo „**Bŭlgarski ezik**“ (Bulgara Lingvo) — Sofio No 6, 1967) Ek. Miĥajlova en artikolo titolita „Iuj demandoj konekse kun la internaciaj lingvoj“ respondas al la jenaj demandoj metitaj de Tr. Milanov el vil. Jana, distrikto de Sofia: 1. Kiu estas la internaciaj lingvoj en la mondo en la nuna momento krom Esperanto? 2. Kiu organo difinas kaj aprobas la internaciajn lingvojn? 3. Ĉu la rusa lingvo estis internacia lingvo antaŭ la Oktobra Revolucio kaj depost kiam ĝi altrudiĝas kiel internacia lingvo?

En j. „**Transportna iskra**“ — Sofio (de 25. VII. 1967) — artikolo de G. Petrova — „Ni konatigas vin kun la esperantista societo“ — la aŭtoro rakontas pri E-societo „Printempo“ ĉe la Sofia Urba Transporto.

En la sama Ĵurnalo (de 27. I. 1968) artikolo de G. Petrov — „Kion ni scias pri la lingvo de la amikeco kaj paco“.

Aperis Mondmapo en Esperanto laŭ la decidoj de Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj. Redaktis Lic. Tibor Sekelj, eldonis Internacia Instituto por oficialigo de Esperanto, 1968. Membroj de la Komisiono: Prof.

Gaston Waringhien, Lic. Tibor Sekelj, Prof. J. M. Mabesone, Prof. David L. Armand, Montagu C. Bultler, F. A. A. Faulhaber, Prof. C. Stop — Bowitz, A. W. Thomson. Eldonkvanto 5000, Prezo 1 us. dolaro aŭ egalvaloro.

HUNGARA PROFESORO INSTRUAS ESPERANTON AL SOVETIAJ GESTUDENTOJ

La 21-an de februaro en la Moskva Universitato okazis prelego de Prof. Istvan Szerdahelyi (Budapeŝto) „La valoro de Esperanto: scienca, pedagogia, didaktika“. Ĉeestis multaj gestudentoj kaj kelkaj speciale invitetaj famaj esperantistoj, inter kiuj estis la plej malnova (ekde 1891) esperantisto en USSR Prof. S. S. Ĉaĥotin.

Prof. Szerdahelyi instruas Esperanton

kaj la rusan lingvon en la Budapeŝta Universitato. Li prelegis ne longe, sed tre pasie kaj konvinkite. La preleginto detale rakontis pri la instruado de Esperanto en la Budapeŝta Universitato kaj montris, kiel la Internacia Lingvo alkiutimigas studentojn logike pensi kaj helpas ilin en studado de aliaj fremdaj lingvoj.

Post la prelego okazis agrabla surp-

rizo. Ĉar Prof. Szerdahelyi restas en Moskvo ĝis la somero, li ekdeziris gvidi E-rondeton por studentoj de la Moskva Universitato. La aŭskultantaro akceptis tiun proponon kun admiro: tuj registriĝis pli ol 30 personoj, kaj al la unua leciono venis ankoraŭ pli multe da dezirantoj lerni Esperanton. La Profesoro instruas la lingvon laŭ rekta metodo; jam dum la unua leciono la studentoj povis ne nur respondi liajn demandojn, sed ankaŭ interŝanĝi demandojn — respondojn inter si. Tio estis vera miraklo por kelkaj jam iomete spertaj universitataj esperantistoj, kiujn la rondeto interesas el metodika vidpunkto kaj kiuj mem siatempe lernis Esperanton ne laŭ rekta metodo. Kvankam pasis jam kelkaj lecionoj, la „tradicia“ falo de la studentoj estas preskaŭ nerimarkebla. Pli ol tio: eĉ eknecesis ŝanĝi la antaŭe planitan por la rondeto ejon, ĉar en ĝi ne por ĉiuj sufiĉas lokoj.

Samtempe kun la menciita prelego

aperis la unua numero de la murgazeto „Esperanto“ — organo de la E-societo ĉe Kulturdomo de la Moskva Universitato. La murgazeto, kiun ni intencas eldoni ĉiumonate, havas sufiĉe grandan areon (2,5 × 1,5 m), kaj tio eblicas prezenti al la legantoj detalajn, diversspecajn, riĉe ilustritajn materialojn. En la unua numero grandan intereson inter la legantoj kaŭzis korespondado inter la ĵurnalisto A. Ĥarkovskij kaj la fama sovetia poeto P. G. Antokolskij pri Esperanto kaj la problemoj pri multlingveco; mapo de Sovetunio, sur kiu estis notitaj centroj de E-movado en USSR; kroniko de eksterlanda Esperanto-vivo k. a. Sur la stando kun murgazeto estas ankaŭ malgranda loko por anoncoj kaj poŝtkesto por recenzoj, demandoj ktp. Multaj interesaj materialoj estas preparitaj por la dua numero, dediĉita al la 100-jara jubileo de A. M. Gorkij.

Viktor Aroloviĉ

EL SOVETUNIO

Eksterlandaj gastoj al la 50-jara jubileo de USSR

Dum la pasinta jaro la atento de l' tuta mondo estis turnita al la lando de Socialismo — USSR, ĉar ĝi atingis la duoncentjaran sian jubileon, kaj ĝia famo en la tuta mondo estis agnoskita ne nur en la amikaj, sed ankaŭ en malamikaj rondoj.

Al sia 50-jara jubileo USSR venis kun granda deziro, ke militaj nuboj ne obstaklus kaj ne prokrastus por nia junularo la helajn horizontojn de feliĉa vivo. La intereso de la socialistaj ŝtatoj estas firme kunligitaj kun la afero de l' paco. Sekve la paco kaj sendanĝereco estas necesaj por ĉiuj homoj en la mondo, ĉar nur la paco naskas socian progreson.

La paca kunekzistado de la landoj kun diversaj sociaj sistemoj tio estas ne abstrakta ideo, sed objektiva neceso. Tial nia ŝtato batalas por la paca kaj justa solvo de la internaciaj konfliktoj.

Por nia 50-jara festo en USSR venis multaj eksterlandaj gastoj. Kun grupo de 60 francaj laboristoj de la 4 ĝis 11. XI. 1967 en Moskvo

estis esp-ino Marsel Robino. La tuta grupo ĉeestis la solenaĵojn sur la Ruĝa Placo en Moskvo okaze de la jubileo.

En Taŝkent (Uzbekio) por la sama celo venis grupo de l' germanaj turistoj el Leipzig, inter la grupo estis k-do Kurt Rofer. Veninte Moskvon, li vizitis Moskvan Internacian E-Klubon, faris bonan informon pri E-agado de Germana Kulturligo.

Zamenhofa vesperfesto en Moskvo

La 10. XII. 1967 en Moskva Internacia E-Klubo la vesperon ni dediĉis al 108-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. La kunsidon malfermis D-ro E. T. Salnikov. Enkondukan paroladon faris k-do T. J. Kulagin kaj recitis la versaĵon de I. Lisiĉnik „Al Zamenhof“.

Pri la tago de E-libro elpaŝis Ĵurnalisto N. F. Danovskij. Li rakontis pri la Centra Moskva Biblioteko de fremdaj lingvoj kie nun estas multaj libroj en kaj pri Esperanto. K-do K. A. Lavrentjev rakontis pri Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj, aperintaj en USSR.

La vesperfeston ĉeestis niaj gastoj: k-do V.



Paškevičius el Vilnius, D-ro I. Szerdahelyi (profesoro de rusa lingvo en Budapeŝta Universitato), kiu rakontis pri la sukcesoj de E-agado en eldona kaj instruata laboro de Hungara E-Asocio.

Inĝeniero E. Zajdman el Kolomna rakontis pri tiea E-movado, kie nun sukcese funkcias instruado de E en lernejoj rondetoj en mez-kaj en muziklernejoj. En la fino la grupo de gejunuloj el Kolomna plenumis kelkajn E-kantojn.

10-jara jubileo de Instruista E-klubo en Moskvo

La 17. XII. 1967 en la Urba Domo de l' Instruistoj en Moskvo okazis vesperfesto dediĉita al la 10-jara jubileo de la Instruista E-Klubo. En la Ruĝa Halo estis aranĝita ekspozicio de diversaj esperantaĵoj. La vesperfeston malfermis k-do N. I. Veselov, kaj raporton pri 50 jaroj de E-movado en USSR kaj eksterlande faris k-do N. F. Danovskij. Li ŝatis kelkajn plej karakterizajn trajtojn de la movado.

K-dino A. K. Malm rakontis pri la internacia korespondado, kursa kaj traduka laboro kaj donis klarigojn pri la E-eksponaĵoj.

La kunvenon salutis Prof. E. A. Bokarev — de Komisiono pri internaciaj ligoj de Sovetiaj esperantistoj; D-ro I. Szerdahelyi de Hungara E-Asocio; k-dino N. D. Sulje — de Virina Sekcio de MEM; k-do N. I. Veselov — de E-Komisiono ĉe Domo de Amikeco; k-do T. J. Kulagin — de Moskva Internacia E-Klubo ĉe Kulturdomo de Medicinistoj; k-dino E. Vitĉinkina — de la esperantistoj en Ĥarkov; k-do V. Medvedev — de E-Klubo ĉe Moskva Ŝtata Universitato. La vesperfesto finiĝis per elpaŝo de lernantoj de E-kurso ĉe la Instruista Klubo.

Jarkunveno de la Internacia E-klubo en Moskvo

Ĝi okazis la 24. XII. 1967, kiam D-ro E. T. Salnikov faris raporton pri la unujara laboro de la Klubo kaj de la Soveta Sekcio de UMEA, kies vicprezidanto li estas. Li rakontis pri la reciproka interhelpo, pri la sukcesoj de E-propagando en Soveta gazetaro kaj pri elpaŝo de prof. E. A. Bokarev ruslingve per Moskva Radio pri Esperanto. K-do I. I. Palkin (peranto) rakontis pri la sukcesa abonkampanjo je Esperantaj eldonoj por la jaro 1968. K-do N. G. Fedotov (gvidanto de E-korespondado) informis la ĉeestantojn pri la kondiĉoj kaj sukcesoj de lia laboro. K-dino N. D. Sulje rakontis pri la agado de Virina Sekcio de MEM.

Internacia E-Klubo en Moskvo honoras la 60-jaran jubileon de sia prezidanto

La 27. XII. 1967 la Kulturdomo de l' Medicinistoj en Moskvo aranĝis la honorigon de la Prezidanto de MIEK kaj vicprezidanto de la Soveta Sekcio de UMEA — D-ro E. T. Salnikov.

Pri la biografio, laborvojo kaj esplora agado de la jubileulo rakontis D-ro de biologiaj sciencoj S. S. Perepelkin. Li menciis lian sukcesan partoprenon en sciencaj, sociaj (partiano de 1944), kaj esperantista (esperantisto de 1922) organizaĵoj.

Persone salutis D-ron Salnikov kaj donacis al li donacojn reprezentantoj de medicinaj, sociaj kaj esperantaj organizaĵoj. Ni notos nur la esperantistajn: Prof. E. A. Bokarev — de E-Komisiono pri Internaciaj ligoj ĉe SOD; k-do T. J. Kulagin — de aktivistoj de MIEK; k-dino A. R. Tonti salutis per propreverkita E-versaĵo; k-dino E. M. Vitĉinkina — de esperantistoj el Ĥarkov per E-akrostiĥo; k-dino A. K. Malm — de E-Instruista Klubo; k-do A. S. Ĥarkovskij — de Ĵurnalista Organizaĵo en Moskvo; D-ro K. A. Lavrentjev — de Soveta fako de UMEA; studento V. Aroloviĉ — de E-Klubo ĉe Moskva Ŝtata Universitato; k-dino A. J. Pipkina — de Sovetiaj esperantistoj veteranoj.

K-do E. T. Salnikov ĉelkore dankis al ĉiuj kaj entuziasme esprimis deziron ffordoni siajn tutajn fortojn, sciojn kaj kapablojn por la bono de l' homaro, por la paco kaj amikeco inter la popoloj.

Novjara kunveno. Literaturo per kaj pri Esperanto

K-dino N. D. Sulje je la 7. I. 1968 en la Internacia E-Klubo en Moskvo menciis multajn etapojn de la originala kaj traduka E-literaturo, aperinta en la tuta mondo dum la pasinta 1967. Nun en preparo estas kompilita E-artikolaro pri la Internacia Vtrina Tago — la 8-a de Marto.

50 jaroj post la anonco de la Dekreto de Lenin „Deklaracio pri la homaj rajtoj kaj la rajtoj de ekspluatata popolo“

La 14. I. 1968 en MIEK oni notis la 50-jaran datrevenon de la publikigo (3/16. I. 1918) de la unua Konstitucio de l' Soveta Respubliko (tradukita en Esperanto), je kies fundamento estis metita la fama „Deklaracio pri la homaj rajtoj kaj la rajtoj de ekspluatata popolo“, aperinta tuj post la Oktobra Revolucio. Raporton je tiu temo faris k-do E. T. Salnikov. En la diskutado partoprenis: Kulagin, Ĥarkovskij, V. Ostroĝnikova, Palkin k. a.

Nia gasto el Bulgario k-do D. Dobrev transdonis la salutojn de la bulgaraj esperantistoj, skize rakontis pri E-movado kaj invitis ĉiujn viziti ĉi-somere Bulgarijon, kie okazos: 1. IX Internacia Festivalo de Gejunuloj kaj Studentoj en Sofio; 2. XX-a Kongreso de la fervojistoj-esperantistoj en Varna kaj 3. la Bulgara E-kongreso ankaŭ en Varna.

K-do D. Cibulskij kore salutis je la nomo de l' esperantistoj el Ĥarkov kaj rakontis pri E-kursoj en la Domo de la Instruistoj kaj en Internacia Klubo „Globus“.

K-do Salnikov sumigis ĉiujn atingojn kaj deziris al la ĉeestintoj pluajn sukcesojn.

La vesperfestoj de literaturaj tradukoj

La 21. I. 1968 en MIEK estis organizita „Literatura E-vesperfestoj“ en kiu partoprenis la jenaj geesperantistoj.

Popova E. P. recitis „Himno de Instruistoj“, vortoj de R. Frenkel, traduko de A. R. Tonti; Ostroŝnikova E. P. tra legis tradukitaĵoj de ŝi fragmentojn el la verko de Gajdar „Ĉuk kaj Hek“; Viĉinkina E. M. (el Ĥarkov) tra legis en propra traduko rakonton „La tre riĉa onklino“ el angla iernolibro; Svetljakova Luda recitis en propra traduko la fragmentojn el „Italaj fabeloj“ de Gorkij; Sidorov A. B. (el Ĉerkasi) legis en propra traduko la rakonton de Iv. Bunin „Skaraboj“; Kulagin T. J. tra legis en propra traduko la artikolon de N. Bolkunov „De koro al koro“.

Magnetofonaj aŭdigoj

K-do Kudrjaviĉij I. G. la 28. I. 1968 venis en la E-klubon kun propra magnetofono kaj stoko da bobenoj kun diversaj E-sonbendoj. Oni elektis la elokventan paroladon de Prof. Ivo Lapenna dum lia pasintjara (15. III) vizito de la Internacia E-Klubo en Moskvo, kiun la ĉeestintoj aŭskultis en daŭro de 1.5 da horoj.

50 jaroj de Soveta Sanzorgado

La 4. II. 1968 en MIEK oni aranĝis vesperfeston, dediĉitan al la problemoj de sanzorgado en USSR. Raportis D-ro E. T. Salnikov. Li parolis pri la historio de la problemoj, pri la fama Popola Komisararo Semaŝko kaj ke liaj heredantoj daŭrigis tiun noblan agadon.

Literaturaj renkontoj

La 11. II. 1968 en la Urba Domo de l' Instruistoj en Moskvo kolektiĝis la geesperantistoj por partopreni en la literaturaj renkontoj. En la unua parto k-dino N. D. Sulje ripetis sian raporton pri E-literaturo, kiun ŝi faris la 7. I. 1968 en MIEK, aldoninte novajn faktojn de eksterlandaj reĥoj pri la jubileaj E-eldonoj de Komisiono pri Internaciaj ligoj de Sovetaj esperantistoj.

En la dua parto, dediĉita al la rusa klasikulo A. S. Puŝkin oni recitis liajn verkojn en E-traduko. En deklamado partoprenis instruistinoj Malm A. K. kaj Popova A. S. De la kursanoj elpaŝis Borisova, Nemceva, Solovjeva kaj Ŝifrin. Kun siaj tradukoj de Puŝkin elpaŝis k-dino Tonti A. R., kiu pliinteresiĝis la vesperfeston.

Teod. Kulagin

TRA LA MONDO

La unua kongreso de Esperanta Meksikia Junularo okazis en Meksiko de la 14-a ĝis la 17-a de decembro 1967. Inter la ĉeftemoj de la kongreso estis enkonduko de Esperanto en la Olimpikoj (la ludoj okazos en Meksikurbo en 1968).

Komence de decembro 1967 en Bamako (Malio) s-ro Ibrahim Tambura prelegis publike pri E-movado kaj faris demonstracion pri la lingvo. Sekvo de tio estis kurso por komencantoj, kiu kunvenas ĉiusemajne sub gvido de s-ro Tambura.

En Aix-en-Provence, Suda Francio, de la 13-a ĝis la 20-a de aŭgusto 1968 okazos la tria kongreso de STELO. La partoprenantoj loĝos en modernaj unupersonaj ĉambroj en la Studenta Hejmo de Aix, kaj kongresos en la Beletro Fakultato de la Universitato. Informojn petu de Studenta Esperantista Rondo, 28 rue Portalis, 13-Aix-en-Provence, Francio.

Skota aŭtoro kaj instruisto William Auld ĵus kompletigis prelalaboron por sia dua lerno-

libro pri Esperanto. La unua aperis en 1965 La dua libro, **Paŝoj al plua posedo**, estas daŭrigo de la unua, **Esperanto, A New Ápa proach**, kiu celis anglalingvanojn. La nova libro enhavas tridekon da lecionoj sur 200 paĝoj, enkondukon al la literaturo kaj gramatikajn ekzercojn. Eldonos Heroldo de Esperanto' Bruselo.

La 24-a kongreso de TEJO okazos en Tarragona, Hispanio, de 27 julio ĝis 3 aŭgusto 1968. La junuloj loĝos en Studenta Domo de la Universitato Tarragona. Informojn petu de HBLIS, Arce 8-2-4, Cornella, Hispanio.

La junulara sekcio de IFEF, la esperantista fervojistaro, nun konsideras pli intiman kunlaboron kun TEJO. Gvidanto de la sekcio, D-ro Imre Ferenczy, intencas proponi al IFEF i. a. regulan interŝanĝadon de delegitoj inter la du organizaĵoj. La JS de IFEF organizos plurajn apartajn programojn dum la IFEF-kongreso en Varna de 11 ĝis 17 majo. Ili inkluzivas futbalan matĉon inter Internacia IFEF-teamo kaj la loka junulara sporta unuigo. La esperantistoj eĉ ricevos profesion trejnadon



utaŭ la matĉo: la konata hungara trejnisto
Geusztav Rozgova proponis senpage siajn ser-
ojn .

* * *
La Tria Junulara Kongreso en Novzelando
okazis en Whangerei de 8 ĝis 12 januaro 1968.

* * *
Aperis la prelegoj de la 10-a Internacia Se-
minario de GEJ en la serio I *Esencaj trajtoj*
de la hodiaŭa mondo kiel libro sub la titolo
„*La mondpercepto de la Modernaj Naturs-*
ciencoj“. La aŭtoroj, konataj fakuloj, devenas
el 8 landoj: B. Popoviĉ, Jugoslavio. Rigardo
de la mikro — kaj Makrokosmo; V Peevski,
Bulgario, Natursciencaj Fundamentoj pri Kos-
monaŭtiko kaj Paccela Utiligo de Satelitoj
Ivo Lapenna, Britio. Internaci-Juraj problemoj
de Spacveturado; Adam Gula, Pollando, Ele-
mentaj korpuskloj kaj la Strukturo de Mate-
rio; Wim de Smet, Belgio, Nunaj mondper-
ceptoj per la Biologio; A. Albault, Francio,
Superpopolado, konsekvenco de Kronika Mal-
sato; Erkki Kääriäinen, Finnlando, Pri la Post-
sekvoj de la Glacia Epoko en Fenoskandio,
Klaus Wandelf, Germanio, Cibernetiko; Hans
Strassl, Germanio, Ranger fotas la Lunon. La
volumo (170 paĝoj, formato 13,5×21 cm, bro-
ŝurita, kun multaj ilustraĵoj) kostas gm 9,60
plus afranko, ĉe Libroservo Ludwig Pickej
Postfach 2113, 85-Nürnberg 2, Germanio.

* * *
„Kopernik — potenco de racio“, estas la
temo de la 4-a Internacia Esperanto-
Seminario en Torun, Pollando, de
4 ĝis 7 aprilo 1968. Adreso: SSRE, Moniuszki
16/20, Torun, Pollando.

* * *
En Sonnenberg, GFR, de 20 ĝis 29 sep-
tembro 1968 okazos Internacia Instru-
isto-Konferenco, organizita de la Espe-
ranto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj kun pre-
legoj je temo: „Fundamentaj homaj
rajtoj kaj liberecoj“.

MONUMENTO EN JAPANIO



*Modelo de la Monumento La infano de l'Atombombo, sta-
rigita en Parko de l'Paco Hiroŝima, memore al la knabino Sasaki
Sadako, kiu forpasis antaŭ 12 jaroj kriante: „For la A-bombo! Mi
estu la lasta viktimo de A-bombo!“*

Redakta komitato: Kiril DRAŤEV, Dimitr ĴDRAKOV, Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV (ĉef-
redaktoro), Simeon D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV, Kunĉo VALEV
Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66 Tel. 83-26-82


UZINO POR PLENUMAJ MEKANISMOJ

„F. KOZOVSKI“ — urbo KNEĴA
Departemento de Vraca

FABRIKAS

jenajn diversajn specojn de
aparatoj por aŭtomatigo kaj
reguligo de la produktad-procedoj:

1. Elektromagnetaj valvoj:
BE $\frac{1}{2}$ " , $\frac{3}{4}$ " ; 1" , $\frac{11}{4}$ " : $\frac{11}{2}$ " kaj 2"
2. BE $\frac{1}{4}$ " por labora fluid-nafto
3. Ŝirmmekanismo por trifaza elektromotoro ĉe restado je du fazoj.
4. Membranaj reguligaj valvoj kun kondiĉa diametro $D_y = 25; 50, 80$ kaj 100..
5. Reguligaj organoj: unusidaj rektaj kaj angulaj kun linia, logaritma karakterizaĵo, malfermita kaj fermita situacio.
Dusidaj kun linia kaj logaritma karakterizaĵoj, malfermita kaj fermita situacio.
Membranaj plenumaj mekanismoj kun forto de la elira trunko 160; 400; 600; 1000 kaj 1600 kgf/cm², premo de la komanda zero 1 atm.
6. Baldaŭ aperos en provserioj:
 - a) Elektraĵ plenumaj mekanismoj rekte funkciaj
 - b) Elektraĵ plenumaj mekanismoj unurivoluaj
 - c) Elektraĵ plenumaj mekanismoj multrivoluaj



PRI INFORMOJ:

Tel. Direktoro № 50
Numerator , № 173

Kvitiĝa konto 220001 ĉe la Bulgara Nacia Banko
— urbo KNEĴA, departemento de Vraca